


# PONTO



Jaro 9 N-ro 1 (44) Organo de Sunda Esperanto Agado februaro 2010

**Esperanto.com** <sup>beta</sup>  
virtuala komunumo

Karaj geamikoj,

laŭ informo de Libera Folio "Amikumu" ne plu ekzistas.

Estas grave, ke esperantistoj kolektiĝu en amasoj ie rete. Lasu nin tial subteni esperanto.com.

Mia salutnomo ankaŭ tie estas „saliko“.

Amike, Peter Weide, Kopenhago

"esperanto.com" estas beta-versio de internacia virtuala komunumo de esperantistoj. esperanto.com estas socia reto, kreita de esperantistoj por esperantistoj. En "esperanto.com" vi povas komuniki kun amikoj, krei grupojn kaj partopreni en ili, aliĝi al eventoj, verki blogaĵojn, alŝuti fotojn, ludi ludojn, diskuti...

La ligoadreso estas: <http://esperanto.com/>

laŭ <http://www.liberafolio.org>

## Fariĝu rete aktiva!

Apude Peter Weide atentigas nin pri **esperanto.com**, kiu certe estos bonega virtuala komunumo. Tie vi povas aktiviĝi kiel esperantisto kaj praktiki la lingvon sidante hejme. Vi utiligas vian konon de esperanto kaj samtempe progresas en la lingvo kaj internaciaj kontaktoj.

Ankaŭ nia propra retejo **www.agado.net** bezonas aktivan partoprenon de la esperantistoj ĉirkaŭ la Sundo. Ni bezonas aktualan kaj belaspektan retejon pri kiu ni povos atentigi interesatojn.

Memoru ankaŭ pri la retpoŝta adreso **esperantoagado@yahoo.se** kien vi povas sendi adresojn de interesatoj.

Sten Svenonius

## SEA-a kunsido

okazos en Helsingborgo 20-a marto.  
Informojn pri horo kaj loko ktp vi trovos en [www.agado.net](http://www.agado.net)!

## SEF-kongreso

okazos en Lesjöfors 13-16/5.  
Pli da informoj sekvos en La Espero.

Ann-Louise Åkerlund

Venonta Ponto, n-ro 2,  
estas planita aperi en la 25.4 2010  
Sendu vian materialon al  
Sten Svenonius  
**plej laste en la 11.4 2010**

## Sunda Esperanto Agado

Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/redakta komitato:


**Kontaktperson:** Sten Svenonius [sten@agado.net](mailto:sten@agado.net)

Vendelsfridsgr 4 c, SE-217 64 Malmö +46 40 19 14 77

Tryck/presado: Per-Olov Johansson +46 40 26 31 94

# La Folio

*Klubo Esperantista de Malmö*



**Jaro 82 N-ro 1 (713) Fondita en 1906**  
**>>ĉiam antaŭen<<**

## EL LA KLUBA VIVO

### Aŭtuna festo 17.10

Nian aŭtunan feston gastigis danaj geamikoj, kaj ankaŭ helsingborganojn ni povis bonvensaluti. La komitatanoj Ulla Ullfors, Elsy Lindblom-Vel, Albert Vel kaj Alf Mobark regalis nin per bongusta sandviĉa torto kaj kafo kun kukoj bakitaj de Elsy. Memorojn elvokis la malnovaj filmoj, nun en DVD. Precipe la filmoj de la UEA-kongreso en Malmö en 1948 kaj tiuj de la semajnoj en Frostavallen estis interesaj.

### La biblioteko 28.10

Ni daŭre prilaboras la bibliotekon por ĝin plibonigi sed ankoraŭ ni devas uzi multan tempon al ĝi.

### Ordinara kunsido 11.11

Pri la kursplanoj por 2010 informis la prezidanto kaj pri la printempaj programeroj Gertrud Lund. Kursoj startos kiam interesatoj aliĝos. Ni decidis aboni la gazetojn Monato kaj La Ondo dum 2010.

Estis akceptita eldoni kvar numerojn de Ponto dum 2010.

Malmö Esperantoförening  
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*  
Tel 040-26 31 94 Bankgiro: 353-0383

Prezidanto:  
Sten Svenonius [sten@agado.net](mailto:sten@agado.net)  
Tel 040-19 14 77

Sten Svenonius raportis pri sia kurso dum la "Kreemaj tagoj" en Kvarnby Popolaltlernejo. Post la studado la grupo devis raporti al la tuta lernejo pri siaj atingoj kaj Sten Svenonius kaptis la okazon informi pri esperanto, la lingvo kaj la celo.

Kopiatoro nun estas surloke, kiu kostis 8.000 kronojn.

Post la kunsido okazis lingva kvaronhoro.

### Aŭkcio 22.11

Nia antaŭkristnaska aŭkcio, la 70-a laŭvice, okazis tute tradicie. Alf Mobark, aganta kiel aŭkcianto, same kiel la ceteraj komitatanoj kaj ĉeestantoj kontribuis al la gaja atmosfero kaj al la bona mona rezulto.

### Amuza vespero 9.12

Nia lasta kunveno de la sezono havis varian enhavon. Por aktivigi niajn cerbojn Per-Olov kontribuis per du krucvortenigmoj. Li ankaŭ kunportis muzikon, same kiel Ulla, kiu alligis sian al la baldaŭa Kristnasko. Gerd legis vintrajn poemojn de Malte Markheden.

### La biblioteko 20.1 2010

La biblioteko postulas ankoraŭ multe da tempo. Ni diligente laboras!

Gertrud Lund

## Har du redan betalt din medlemsavgift för 2010?

Kluba membreco	Membreco ankaŭ en SEF
Membro de KEM 150 kr	310 kr (160 kr por SEF)
Junulo ĝis 20 jaroj 60 kr	140 kr (80 kr por SEF)
Familio 200 kr	440 kr (240 kr por SEF)


La klubo plusendos al SEF la koston deciditan de ĝi.

La abonprezo por Ponto estas 70 kr por 2010.

**OBS! Vi använder bara bankgiro!**  
**Bankgiro 353-0383, Malmö Esperantoförening**

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*  
*Konversacia Esperantista Klubo*  
*Kopenhago*  
N-ro 1 (683) 2010 74 a-jaro



Ĝeneralkunveno de KEK la 15-an de februaro 2010  
Je la 19.30-a horo

## TAGORDO

1. Elekto de direktanto.
2. Elekto de protokolanto.
3. Raporto de la prezidanto pri la agado dum 2009
4. La kasisto prezentas la kalkulaĵon por 2009.
5. Raporto pri la biblioteko.
6. Proponoj (ili estu ĉe la prezidanto 10 tagojn antaŭe).
7. Elekto de la prezidanto. Betty Chatterjee pretas reelekti.
8. Elekto de 2 estraranoj por 2 jaroj. Bent Wiinberg ne deziras reelekton. Arne Casper pretas reelekton.  
Elekto de 1 estrarano por 1 jaro, ĉar Jytte Sunekær deziras retiriĝi.
9. Elekto de 2 estraraj anstataŭantoj por 1 jaro. (Bent Jensenius kaj Ib Jensen pretas reelekti)
10. Elekto de 1 revizoro por 2 jaroj .
11. Elekto de 2 revizoraj anstataŭantoj por 1 jaro.
12. Eventualaĵoj.

## Raporto de la prezidanto 23.02.2009 – 15.02.2010

### **Membronombro**

Dum 2009 KEK havis 60 membrojn, inkluzive 1 honoran. Tial dum la jaro la membraro malkreskis je 9 membroj.

Dum la jaro forpasis unu membro, nome Bent Bjarke Nielsen.

### **Pri la klubejo**

Printempe 2009 pro la translokiĝo de la Junulara Domo al la kulturo-domo oni devigis nin mem translokiĝi al nia nuntempa ejo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV.

### **Kursoj kaj studgrupoj**

La studgrupo gvidata de Bent Wiinberg daŭre legis la libron 'Faktoj kaj Fantazioj' kaj de tempo al tempo oni legis aliajn tekstojn interalie de Claude Piron. Printempe Arne Casper- Mortensen gvidis grupon da lernantoj, kiuj eklernis Esperanton en 2008. Babilada grupo lunde renkontiĝis ĝis la somera klubfermo en la klubejo. Aŭtune ekfunkciis grupo da komencantoj (6 personoj) gvidata de Zita Garbaravicienė laŭ la Cseh-metodo. Bent Jensenius gvidas grupon da daŭrigantoj laŭ lia libro 'Bonvenon en nia mondo.'

### **La kluba programo enhavis la jenajn prelegojn:**

'Laoso la estonteco kaj la turismo.' Jan kaj Lene Niemann.

'Kultura Esperanto-Festivalo 2009.' Kim Henriksen.

'La mirindaj eblecoj por esperantistoj ĉe la interreto.' Regin Larsen.

'Vikipedio.' Ruth Jesus.

'La plezuroj kaj la malplezuroj de vortaro-kompilanto.' Jens Stengaard Larsen.

'La 2-a Mezorianta Kunveno en Turkio.' Betty Chatterjee

'Vizito al Madrido.' Bent Jensenius

'Orepoka bildo.' Birgit Andersen.

'Charles Darwin kaj lia signifo por la dana literatur-historia trapaso'. Egon Starup.

'La vivo kaj la agado de Ivo Lapenna.' Birthe Lapenna

'Martinus og den ny verdensmoral.' Ole Therkelsen


'Ĉu vi kongresos en Kubo en 2010?' Ileana Schrøder.

Aliaj aranĝoj inkluzivis kantvesperojn, distrajn vesperojn kaj du aŭkciojn. Kelkfoje ni parolis pri libroj legitaj aŭ ni rakontis pri kunportitaj diversajtoj. Bent Jensenius defiis nin per muzikaĵoj el diversaj landoj. Ni ekskursvesperis en la restoracio 'De Små Haver'. Ni somerfestis kaj kristnaskfestis. Okaze de la 10-a Internacia Patriningva Tago la klubanoj danigis la Deklaron de UEA pri lingvaj homaj rajtoj, kaj tiu nun legeblas en la dana ĉe <http://www.uea.org/informado/un-deklaro.html>.

Laŭtradicie KEK havis budeton ĉe Peblinge Dossering dum la Internacia Tago de Kopenhago. Post la decido ke Kopenhago gastigos la UK-on en 2011 la klubanoj komencis tradukan laboron kun la apogo de la Næstved klubanoj.

Pro la sufiĉe favora monstato de la klubo ni povis monapogi aliajn esperantajn asociojn, kies agadoj ankaŭ helpas la membraron de KEK: edukado.net, Kultura Esperanto Festivalo kaj DEA. La kasisto informos vin pri tiuj ĉi elspezoj.

Fine mi volas danki la estraron de KEK, la klubanaron, DEA-n kaj aliajn esperantistojn ekstere de la klubo pro la apogo dum 2009. P.S. Post la skribado de tiu ĉi, Jytte informis min pri sia decido eliri de la estraro. Tial mi volus danki ŝin por la pacienca kaj bona laboro, kiun dum multaj jaroj ŝi faris.



*Klubo  
Esperantista  
de  
Helsingborg*

Bonan novan jaron!

Mi esperas ke vi ĉiuj (re)komencis vian aktivadon por kaj per esperanto. Ni iom prokrastis la komencon de nia studrondo al la 2-a de februaro, pro mia vojaĝo orienten. Tamen ni bone studos dum la semestro, ĉu ne?!

Pasintjare ni dum la printempo plejparte laboris por kunmeti kaj traduki turismajn informojn pri malnova Helsingborg, kiujn ni uzis dum la ekskurso en junio. Aŭtune, tamen, ni serioze finstudis la materialon EpoGo. Dum tiu ĉi jaro ni uzos diversajn materialojn, kiujn ni jam havas aŭ povos trovi en Interreto, verŝajne ankaŭ la novan libron de Bent Jensenius.

Ni spertis grandan perdon en marto kiam forpasis Barbro Haraldsson, multjara, entuziasma kaj ide-

riĉa esperantistino. Tamen aperis nova membro, kiu komencis lerni pere de semajnfina kurso en Elsinoro kaj memstudado.

Ĝojiga afero estis la sukceso de Annika enkonduki esperanton kiel Elevens val en sia lernejo kaj ekhavi 14 gelernantojn. Krom tio ni transdonis librodonacojn de Eldona Societo Esperanto al sep gimnazioj en Helsingborg.

La grandaj eventoj dum la jaro estis la SEF-kongreso en Borlänge, kie partoprenis kvar membroj, la UK en Bjalistoko kaj la KEF en Elsinoro, kie Peter kuiris maten- kaj vespermanĝon kaj lige al kiu ni aranĝis koncerton de Ĵomart kaj Nataŝa en Folkets Hus en Helsingborg.

Kiel kutime membroj de nia klubo partoprenis aranĝojn de la aliaj kluboj en la regiono, ekzemple printempan kaj aŭtunan festojn en Malmö, Lapenna-kaj Zamenhof-festojn en Kopenhago, antaŭkristnaskan feston en Lund, kursojn en Malmö kaj Kopenhago ...

Komenciĝis nova laborjaro, kiam ni devos kapti la okazon vaste informi pri esperanto kaj pri la venontjara UK en Kopenhago.

Bonan laboron!

Ann-Louise



**Klubo  
Esperantista  
de  
Lund**

Karaj LEK-anoj!

Espereble 2010 por vi ĉiuj bone komenciĝis.

Unue ni revenu al aŭtunaj kunvenoj:  
En la 13.11 Ragnhild Berntsson-Laskowski rakontis interesaĵojn pri la kastelo de Borgeby. Vidu ŝian apartan inviton.  
Ni jam decidis pri vizito sub gvido de Ragnhild, la 13.6, kunige kun pikniko.  
Estrarkunveno okazis la 24.11. En la 13.12 estis nia antaŭkristnaska festo.  
Ĝin ĉeestis 16 personoj, inter ili gastoj el Malmö kaj Helsingborg.  
Anna-Maria rememoris sian unuan Luĉia-feston en LEK antaŭ 40 jaroj. Tiu festo en Lund estis ŝatata aranĝo en nia regiono, ĝis en la 1980-aj jaroj, kiam pro manko de infanoj ni

transiris al antaŭkristnaska festo. Ĉi-jare Linda, nepino de Harry Engkvist, akompanis nian kantadon surpiane. Ann-Louise Åkerlund legis ĉapitron el Koko krias jam, novelaro de Ferenc Szilágyi. Ĝi temis pri Luĉia-mateno en Vermlando. Fine Ulla, laŭ tradicio, sukcese gvidis aŭkcion.

**Jarkunveno: 11 de februaro, 18.30 ĉe Sensus.  
Postaj klubkunvenoj: 11/3, 8/4, 6/5.**

Notu nian lingvan kvaronhoron dum ĉiu renkontiĝo.

Salutas la estraro de LEK

Bonvenon al la kastelo de Borgeby kaj renkontiĝo kun la pentristo de cikonioj en la 13.6!  
Posedanto estas la komunumo de Lomma. La kastelo havas tre interesan historion, ek de la mezepoko ĝis hodiaŭ. Supozeble la dana reĝo Haraldo Bludento tie loĝis.

Inter 1902-1953 gesinjoroj Hanna kaj Ernst Norlind tie kreis kulturcentron, kaj hodiaŭ tie estas la Muzeo de Norlind kun pentraĵoj de Ernst kaj la filo Staffan.

Bonvenon al promeno tra la parko kaj vizito en la Muzeo!

Ragnhild Berntsson-Laskowski, Tel 040-411699 aŭ 0708-901376; e-mail: borgebyguide@gmail.com

## PROGRAMO EN MALMÖ

- Merkrede 17.2 Viva gazeto. Redaktoro Asta Schaedel
- Merkrede 3.3 Jarkunsido – årsmöte. Tagordo en Ponto 4-2009 paĝo 7
- Merkrede 17.3 Libroaŭkcio – bokauktion. Massor av böcker på esperanto och svenska
- Merkrede 31.3 Interese pri esperanto en la komputilo. Lär känna föreningens dator.
- Sabate 17.4 Printempa festo – vårfest  
16.00 h El la programo: ISRAELO  
Pri siaj impresoj de la Lando de la Biblio rakontos Lisbet kaj Bertil Andreasson  
Ili kunportos interesajn kaj belajn bildojn
- Merkrede 28.4 La kastelo de Borgeby. ”De Haraldo la Bludenta ĝis Ernst Norlind”  
Ragnhild Berntsson-Laskowski, Lomma, rakontos
- Merkrede 12.5 Ordinara kunsido

## Programo de KEK

Informoj pri ne jam deciditaj temoj legeblas ĉe <http://sea.saluton.dk/> kaj per la semajnaj mesaĝoj.

- 8-a februaro Kantvespero.
- 15-a februaro Jarkunveno de KEK
- 22-a februaro La Tago de Gepatraj Lingvoj (t.e. la 21-a februaro). La Semajno de Internacia Amikeco t.e. la lasta semajno de februaro).
- 1-a marto Regin Larsen prelegos pri la junulara agado.
- 8-a marto Henning kaj Karen distros nin per numero-ludo.
- 15-a marto Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg
- 20-a marto SEA-a kunsido en Helsingborgo.
- 22-a marto Bent Jensenius prelegos ‘pri la historio de instrumentoj de fremdaj lingvoj. Interese por ĉiuj, kiuj jam lernis fremdan lingvon. Estos spicite per multaj ‘anekdotoj.’
- 29-a marto Prelego Jacob Nordfalk prelegos pri maŝintradukado Esperanta.
- 12-a aprilo Printempa aŭkcio
- 19-a aprilo Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg
- 26-a aprilo Ne jam planita
- 3-a majo Amir prelegas pri ‘Faktoj kaj fantazioj pri Islamo.
- 10-a majo Ne jam planita
- 17-a majo Ne jam planita
- 31-a majo Studgrupo
- 7-a junio Jan kaj Lene pri Irlando
- 14-a junio Ne jam planita
- 21-a junio Somera festo.